

Usona Esperantisto

Dumonata bulteno de Esperanto-USA • Numero 2011:6 (nov-dec)

American Esperantist
Bi-monthly bulletin of Esperanto-USA • 2011:6 (Nov-Dec)

THE NEW DOCUMENTARY ABOUT ESPERANTO FROM THE ACADEMY AWARD NOMINATED DIRECTOR SAM GREEN.

LA NOVA DOKUMENTFILMO PRI ESPERANTO DE REĜISORO, KIU ESTIS
NOMUMITA POR OSKAR-PREMIO, SAM GREEN.

la UNIVERSALA LINGVO

DOKUMENTA FILMO DE SAM GREEN



SPEKTU ĜIN NUN!

WATCH IT NOW!

WWW.DOKUMENTAFILMO.COM

WWW.ESPERANTODOCUMENTARY.COM

Ĉi-numere:

- Facila teksto: *La blanka ĉevalo*
- Esplorkomitato pri UK en Usono
- Esperanto: A language of choice
- ...kaj multe pli!

Nova filmo de reĝisoro Sam GREEN debutas (pĝ. 5)

Usona Esperantisto

Dumonata bulteno • Bi-monthly bulletin

Vol 50, No 6 — 2011:6 (nov–dec)

Redaktisto • Editor: Hoss FIROOZNI

Sendu kontribuojn al • Send contributions to:

✉ bulteno@esperanto-usa.org

📍 Usona Esperantisto, c/o Hoss Firooznia
CPU 271205, U. of Rochester
Rochester, NY 14627-1205, USA

Usona Esperantisto (American Esperantist) is the bi-monthly magazine of Esperanto-USA. We welcome contributions in both Esperanto and English; please use email if possible and include your name, your address, and a close-up photo. With other photos please include the name of the photographer and subject(s), location, and date. We will return materials by mail if you include a self-addressed, stamped envelope.

You may reprint content two months after publication if you give credit; please send a copy of any reprinted materials to an address above. Opinions expressed are those of the individual authors and do not necessarily reflect the views of the editor or of Esperanto-USA.



Usona Esperantisto estas la dumonata bulteno de Esperanto-USA. Ni bonvenigas kontribuojn kaj en Esperanto kaj en la angla. Prefere uzu retpoŝton, kaj aldonu viajn nomon, adreson kaj foton de via vizaĝo. Al aliaj fotoj bonvolu aldoni notojn pri datoj, lokoj, kaj nomoj de foti(n)toj. Ni perpoŝte resendos materialojn se vi sendas mem-adresitan, afrankitan koverton.

Oni rajtas reaperigi materialojn du monatojn post la eldondato, kun fontindiko. Bonvolu sendi ekzemplerojn de republikigita materialo al supra adreso. Opinioj esprimitaj ĉi tie apartenas al la individuaj aŭtoroj, kaj ne nepre spegulas vidpunktojn de la redaktisto aŭ de Esperanto-USA.



Centra Oficejo • Central Office

✉ PO Box 1129, El Cerrito CA 94530 USA

☎ 510.653.0998; 2510.653.1468

✉ info@esperanto-usa.org

<http://esperanto-usa.org>

Direktoro • Direktoro, CO: William B. HARRIS

Prezidanto • President: Orlando E. RAOLA

Vicprezidanto • Vice President: Philip G. DORCAS

Sekretario • Secretary: Steve BREWER

Kasisto • Treasurer: Christopher ZERVIC

Aliaj estraranoj • Other board members: George

BAKER, Neil BLONSTEIN, Steven CYBULSKI, D. Gary GRADY,

Tor KINLOK, Julie SPICKLER, Gan STARLING, Julie WINBERG,

Christine WINGROVE.

Forpaso: Stanley J. DRAKE

D-ro Stanley J. Drake, honora membro de Esperanto-USA, forpasis la 2-an de decembro, 95-jaraĝa, en Atlanto, Georgio.

Li esperantistiĝis en la 70-aj jaroj kaj tre vigle aktivis post sia emeritiĝo kiel prezidanto de Fort Lauderdale University en Florido, ĉeestante plurajn Universalajn Kongresojn kaj multajn regionajn kaj landajn kongresojn, kelkajn el kiuj li helpis organizi. Li instruis Esperanton en universitataj kaj neformalaj kursoj diversloke kaj ankaŭ informadis pri Esperanto. En la 90-aj jaroj, artikolo pri la spertoj d-ro Drake en Esperantujo aperis en diversaj ĵurnaloj en multaj partoj de Usono kaj interesis multajn homojn pri la lingvo.

Li membris en Universala Esperanto-Asocio, kelkaj landaj asocioj, Esperanto-Societo de la Karolinoj kaj Virginio (kiun li helpis organizi), Amerika Asocio de Esperanto-Instruistoj, kaj Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj.

En 1978 li fondis la Internacian Societon de Amikeco kaj Bonvolo kaj servis multajn jarojn kiel ties ĝenerala sekretario kaj poste prezidanto.

Ekster la Esperanto-movado, d-ro Drake instruis en pluraj universitatoj kaj en 1968 fondis Amerikan Asocion de Prezidantoj de Sendependaj Kolegioj kaj Universitatoj. Ses kolegioj kaj universitatoj nomis lin honoriga doktoro, kaj la 10-an de majo 1973 Senatano Lawton CHILES laŭdis lin pro lia laboro en la kampo de la usona alta edukado. Li kaj lia edzino Virginia (kiu mortis kelkaj jarojn antaŭ li) multe vojaĝis tra la tuta mondo. Postvivas lin liaj tri filinoj kaj iliaj familioj.

(Informo danke al D. Gary GRADY.)

We need you! Your membership fees help promote Esperanto and provide services to speakers and students across the country. Members receive the bi-monthly magazine *Usona Esperantisto*, the *Membership List*, discounts from the Book Service, access to online resources (mailing lists, blog space, etc.) and a discount at the national convention. Please join (or renew) today!

Return with payment to: **Esperanto-USA, P.O. Box 1129, El Cerrito CA 94530**

Name: _____

Address: _____

City & State: _____

Postal code & Country: _____

Phone: _____ E-mail: _____

Birthdate (MM/DD/YY): ____/____/____

In the member list, don't publish my: postal address phone email address

Send me info on joining the *Universala Esperanto Asocio*

Please check **one** category of membership/support:

- Friend of Esperanto \$10.00
(not a membership, but you receive 3 issues of the newsletter)
- Youth *(you must be under 27)* \$20.00
- Limited Income \$20.00
- Individual \$40.00
- Family \$60.00
- Sustaining \$80.00
- Life *(birthdate required)* \$800.00

I would like to receive the magazine, *Usona Esperantisto*, in:

Paper form only Electronic (PDF) form only *(email address required)* Both

Credit card info: Visa Mastercard

Number: _____ Expires(M/Y): ____/____

Card verification #: _____ *(three digits on back of card, or on front for AmEx)*

lokaj grupoj

Contact addresses

Here are addresses for some of the larger local groups that meet regularly. Please send updates to <bulteno@esperanto-usa.org>.

California

Sacramento: <http://esperanto.org/us/esos>

San Diego: <http://groups.yahoo.com/group/EsperantoGrupodeSanDiego>

San Francisco:
<http://esperanto.org/us/SFERO>

Santa Barbara: dorothyjeanh@gmail.com

Colorado (Longmont) <http://ek-ek.org>

Connecticut (Wallingford) <http://esne.net>

District of Columbia <http://esperantodc.org>

Florida <http://niasfero.blogspot.com>

Georgia (Atlanta) <http://esperanto-atlanta.org>

Hawaii (Honolulu)
<http://esperanto.org/us/Honolulu>

Idaho (Boise) <http://terpomuloj.org>

Illinois

Champaign-Urbana: <http://ekoci.org>

Chicago: <http://esperanto-chicago.org>

Maine (Bangor, Houlton) <http://esne.net>

Massachusetts (Acton, Amherst, Cambridge, Northampton) <http://esne.net>

Missouri (St. Louis) <http://esperanto-stl.org>

New Jersey (Princeton)
<http://esperanto-nj.tripod.com>

New York

New York: <http://esperanto-nyc.org>

Rochester: <http://esperanto.lodestone.org>

North Carolina (Raleigh Durham)
<charles.o.mays@gmail.com>

Texas

Austin: <http://esperantoklubo.konfuzo.net>

Dallas: <http://esperanto-tx.org>

Virginia (Hampton Roads) <http://bonege.com>

Washington (Seattle)
<http://seattlesperanto.org>

Wisconsin (Madison)
<http://groups.google.com/group/esperanto-societo-madison>

Diverslokaj festoj por E-tago

ĈIKAGO, ILINOJSO — Solene kaj bunte festis la naskiĝtagon de Zamenhof en Ĉikago gesamideanoj el Ilinojso, Indianao, kaj Viskonsino. En la luksa gastsalono de la Ŝuista Placo en la Malnova Urbo (*Cobbler Square, Old Town*) sonis *La Espero* – ankaŭ violono, gitaro, piano, fluto. (*Raportas Viktor PAYUK*)



EMERYVILLE, KALIFORNIO — Parto de la Esperanto-grupo de la San-Franciska golfo (SFERO) kuniĝis ĉe la Publika Vendoplaco de Emeryville. Omaĝe al Zamenhof ili kantis “Feliĉan Nasktagon al Vi” kaj manĝis verde glazuritan kukon. Poste, ĉiuj havis verdajn langojn.

Babiladaj temoj ĉefe rilatis al la Zamenhofa Bankedo, okazante januare. Tio estas la ĉefa ĉiujara evento por la grupo, planita por januaro por ke ĝi ne konkuru kun la aliaj festotagoj de Decembro. (*Raportas Andrea MONTICUE*)



New film on DVD

The Universal Language charts the tumultuous history and humanistic ideals behind Esperanto. This new documentary by director Sam Green draws on archival footage and interviews with present-day speakers. In addition to providing a primer on the history of Esperanto, the documentary serves as a touchstone for discussions on an array of topics including the contexts of political action, social movements, language studies, European history and the currencies of hope and futility in today's cultural climate.

Tracing an arc from Esperanto's birth in the Russian empire through the optimism of the early 1900s, two world wars, the ideological divides of the Cold War, and the rise of globalization, the film places Esperanto in the context of larger social and political struggles. What emerges is a portrait of a complex utopian project, resilient enough to withstand punishing setbacks, yet still largely marginalized and ignored.

Sam Green is a San Francisco-based documentary filmmaker. His film *The Weather Underground* was nominated for an Academy Award in 2004 and broadcast nationally on PBS. His most recent documentary *Utopia in Four Movements* premiered at the 2010 Sundance Film Festival and is currently screening widely. He is currently an Artist in Residence at the Exploratorium Museum in San Francisco. For more information, see

<<http://dokumentafilmo.com>>. Institutional and educational organizations that would like to add the film to their collections or organize a public screening should contact <samgreenfilm@gmail.com> or call 1 (415) 345-7716.

Nominations for 2012

In 2012 Esperanto-USA will conduct an election for Treasurer and three Directors. Here are the related sections of the bylaws:

- ▶ *Any member who will be at least 18 years of age as of the date of the beginning of the term of office may be nominated for Director.*
- ▶ *Any member who will be at least 30 years of age as of the date of the beginning of the term of office may be nominated for Treasurer.*
- ▶ *The Nominating Committee shall notify the President, Secretary, and the Director of the Central Office as to the candidates before March 1.*
- ▶ *Any five or more members of the League may make a written nomination of any candidate, **sending such request to the Chairman of the Nominating Committee before February 15.***

Members of the election committee are:

- **Ronald Glossop**, Chair
<rglossop@mindspring.com>
8894 Berkay Avenue, Jennings MO
63136-5004
- **Yevgenia Amis**
<yevgeniya_amis@yahoo.com>
- **Chuck Mays**
<charles.o.mays@gmail.com>
- **Tim Westover**
<timwestover@yahoo.com>
- **Ed Williger**
<trio@Esperanto.org>

Besides the formal procedure, any person can informally send suggestions to any member of the committee.

— *Ronald Glossop*
Chair, 2012 election committee

Laŭdoj por niaj verkistoj

Dankon al Joshua MORRIS pro liaj regulaj kontribuoj al *Usona Esperantisto*! Li evidente estas talenta verkisto, kaj spertas tre interesan vivon en loko (al ni en Usono) ekzotika. Mi ĉiunumere antaŭĝojas legi lian kontribuon.

—Joel BROZOVSKY
<betulo@mac.com>



Mi gratulas pri n-ro 2011:4 de *Usona Esperantisto*. La artikolo de Joshua MORRIS informas ĉarme, kaj mi ĉiam legas la instruon de Steven CYBULSKI.

—E. James LIEBERMAN
<ejl@gwu.edu>

Memore al niaj instruistoj

Hal DREYER [*kies forpason notis n-ro 2011:5*] estis mia unua instruisto. Mi revenis de Eŭropo, 19-jara, en 1954, post unua kontakto kun vivaj parolantoj de Esperanto. Mi konfirmis, ke la lingvo vere funkcias, en 1957, kiam mi partoprenis la UK-on en Marseilles.

—E. James LIEBERMAN
<ejl@gwu.edu>



[*Rilate al la forpaso de Henry STUDER, notita en n-ro 2011:1*] Pri tiu, kiu transformis la kalifornian “Davis” al Daviso: Homarama, kuraĝiga profesoro en ĝinzo.

Studinte sole dum jaroj, timege mi staris en angulo dum kongresa interkonatiĝa vespero, foliumante la jam ne disdonitajn programojn.

Jen tiel agrablajn demandojn mi estis demandanta! Menciinte iun tiaman kas-edon pri nialingva prononcado, mi aŭdis, “mi ne sciis pri tio”, kaj denove la saman.

En tiu la komenco de rilato nia, donis al mi la ŝlosilon sopiratan mia memorata kun granda amo Henry STUDER.

—KuraĝiGito (*Keneĉjo GOLDBERGO*)

Pri konservoj kaj ŝanĝoj

En la antaŭa numero de *UE*, nia prezidanto proponis ŝanĝon en la politiko pri nia bulteno. Li nomis la proponon VARIANTO UNU. Mi proponas alternativan politikon, do VARIANTO DU.

La bulteno estu havebla kaj rete kaj surpapere. Fakte, la pliparto de la homoj, kiuj lastatempe aliĝis, petis surpaperan liveradon. Per tio, ni sekvas la ekzemplojn de *Esperanto*, *Kontakto*, *Ondo*, kaj *Monato*.

Ĉiu numero de la bulteno estu havebla nur al membroj dum 30 tagoj. Post 30 tagoj, la numero estu havebla al ĉiu intereso. La E-USA-a kotizo restu same por reta kaj surpapera sendado.

La eldon-ritmo de la bulteno restu dumonata. Diskutoj pri la enhavo aperos en la blogspaco de nia retejo. Ne necesas aparta, konkursa diskutloko ĉe la bultena retloko.

Nuntempe, reta liverado de Esperantaj revuoj estas en formato PDF. Estas aliaj formatoj, kiuj estas pli taŭgaj por perreta legado. La avantaĝo de la formato PDF estas, ke la redaktoro povas eldoni kaj rete kaj surpapere sen kroma laboro. En la estonteco, la defio de la redaktoro estos trovi formaton por la reta bulteno

kiu estas pli legebla ĉe komputilo kaj legilo (Kindle, Nook, etc.) kaj samtempe estas facile eldonita surpapere.

—Bill HARRIS, Direktoro, CO
<eusa@esperanto-usa.org>



Responde al artikolo de la prezidanto pri lia propono ŝanĝi la formon kaj oftecon de la gazeto, mi volas proponi alian eblon: anstataŭ ŝanĝi la gazeton, ni pli bone uzu nian retpaĝaron! Kvankam nia retejo bone funkcias kiel “virtuala komunumo” por tiuj, kiuj ĝuas verki proprajn blogojn, ĝi tute ne taŭgas por membroj kiuj simple interesiĝas pri tio, kio okazas en nia movado. Ĝi devus esti pli alloga kaj aktuala por ke oni facile vidu, kion faras nia organizo.

Ŝanĝi la gazeton por ke ĝi estu nur parto de la retpaĝaro ne vere donas avantaĝon de pli aktuala informo, ĉar por la plej freŝaj aktualajoj jam ekzistas pluraj aliaj informkanaloj. *Usona Esperantisto* ne estas tia – ĝi estas forumo por bone verkitaj artikoloj, distraĵoj, kaj anoncoj en gazeta formo. Cetere, membroj jam ricevas ĝin kaj papere kaj elektronike. Eĉ ne-membroj jam rajtas elŭti ĉiujn numerojn krom la plej lasta, senpage.

Orlando menciis la gazeton *Christian Science Monitor* (CSM), kiu lastatempe fariĝis senpaga reta ĵurnalo, nur malofte ofertante resumojn en papera formo. Tiu modelo ne bone taŭgas por ni, interalie ĉar CSM dependas de enspezo per vendado de reklamoj. Ĝi ĉesis eldoni papere ne pro apartaj meritoj de reta eldonado, sed ĉar ĝi ne sukcesis profiti sufiĉe, kaj malmultekosta reta eldonado estis pli bona alternativo ol nenia eldonado.

Kontraste al CSM, Esperanto-USA estas organizo subtenata de membrokotizoj, kaj ĝi ne dependas (kaj ne rajtas dependi) de tia reklama enspezo. Malkiel CSM, ĝi ne bezonas ŝanĝi sian paperan eldonadon.

—Lusi HARMON
<lusiharmon@esperanto.org>

Korespondi deziras

Mi estas 41-jaraĝa komercistino en Slovakujo kiu studis socialan laboron en la universitato. Nun mi finas mian doktorecon en teologio – Judaismo. Mi laboras ankaŭ kun handikapitaj infanoj kaj viktimoj de krimoj. Mi komencis lerni Esperanton kiam mi estis 18-jaraĝa, kaj mi eĉ laboris en la Slovaka Esperanto-Asocio en Poprad (Altaj Tatroj) kiel turist-gvidantino. Mi tre ŝatas legi – ĉefe klasikan literaturon. Mi ŝatas ankaŭ historion, arkeologion, sociologion, kaj aŭskulti klasikan muzikon (sed ne nur). Mi serĉas gesamideanojn kiuj volas interŝanĝi ideojn kaj spertojn. Mi volas koni pli bone vian landon, vian kulturon, kaj tradiciojn.

**Anetta SMIKOVÁ, Námestie Oceliarov, 21
040 15 Košice 15, SLOVAKIA
<anetta@inmail.sk>**

Skribu al *Usona Esperantisto!*

Bonvenaj estas viaj komentoj (en la angla aŭ en Esperanto) ĉu pri Esperantujo, ĉu pri la lingvoproblemo, aŭ ĉu pri io lastatempe aperinta en *UE*. Leteroj estu prefereme ne pli ol 300 vortojn longaj; anoncoj, ne pli ol 400. Sendu mesaĝojn al:

bulteno@esperanto-usa.org



Pri la Esperanto-kongresoj

Bonvolu legi atenteme la sekvan parafrakon pri la eduka signifo de la Esperanto-kongresoj:

Izolitaj esperantistoj, kiuj neniam havis la eblon praktike apliki tion, kion ili lernis, ofte dubas, ĉu efektive per Esperanto oni povas tute bone interkompreniĝi. Eĉ interne de la esperantistaj grupoj oni ofte ne kuraĝas paroli esperante, oni balbutas, oni preferas paroli en sia nacia lingvo, kaj proporcie al la nekuraĝeco de la parolado aperas ankaŭ nekuraĝeco de propagando, ĉar la esperantistoj-balbutantoj malgraŭvole ne povas liberigi sin de la timo, ke eble tamen Esperanto estas afero pli teoria ol praktika. Sed kiam la balbutanto venas al kongreso, kie li havas la eblon aŭdi bonajn kaj spertajn oratorojn, kiam li per siaj propraj oreloj kaj okuloj konvinkiĝas, kiel bele kaj flue oni povas paroli en Esperanto, li entuziasmiĝas, li vidas ke li laboras por io viva kaj vivo-plena, ili revenas hejmen kun nova kuraĝo kaj energio.

Pasis jam pli ol cent jaroj de kiam Zamenhof elparolis ĉion ĉi en kongreso de ruslandaj esperantistoj. Liaj saĝaj vor-



Orlando E. RAOLA

Orlando estas prezidanto de Esperanto-USA. Li loĝas en Greenbrae, Kalifornio. Vi povas kontakti lin per la adreso:

oraola@gmail.com

toj estas same aktualaj hodiaŭ kiel ili estis antaŭ cent jaroj. Bedaŭrinde, por usonaj esperantistoj, Universalaj Kongresoj de Esperanto restis ĝis nun sufiĉe for, plejparto el ili en Eŭropo (80 el 96 ĝis nun). Ankaŭ niaj regionaj kongresoj ne estas tiom sukcesaj altiri diverslingvanojn, precipe pro la grandeco de la landoj en tiu ĉi kontinento kaj pro la relativa manko de lingva diverseco kompare kun aliaj mondopartoj.

Jen pliaj kialoj por peti, ke ni havu Universalan Kongreson en Usono kiel eble plej baldaŭ! Bonvolu memori ke ni starigas esplorkomitaton aŭ task-forton por esplori la eblecojn havi ĉe ni la kongreson.

Se vi pretas kunlabori, bonvolu anonci vin al la Centra Oficejo ĉe ceusa@esperanto-usa.org. Ni antaŭdankas vian kontribuon. ★

Senintenca esperantaĵo?



Ŝildo de vitro-firmao en la sama konstruaĵo kie lastatempe situis la CO. Bona marko, ĉu ne? Nuntempe, kio estas pli vera ol mono?

Ricevu UE-on elektronike!

Aliĝu al la listo de ricevontoj! Tuj kiam freŝa papera versio presiga, vi ricevos retmesaĝon kun la adreso de rete elŝutebla versio. Por aliĝi, sendu mesaĝon al:



bulteno@esperanto-usa.org

Reading for Learning

As we all know from the experience of our own childhoods, it's possible to learn the basics of a language without doing any reading. There are language courses (Pimsleur, for example) based entirely on spoken language. The classic *Cseh-Metodo* traditionally makes some use of written language, but it's not strictly necessary. For some students, such as those with dyslexia or vision problems or who simply have a strong preference for spoken language, a course without a reading component is preferable.

All that said, reading has major advantages for a language student. We can read at our own pace, stopping to puzzle over a sentence, re-read it, look up a word, or make notes. Reading is also likely to expose us to a wider vocabulary.

Especially with beginners, it's important to help students select things to read that won't discourage them (and ideally won't bore them, either). Jokes work well, for example:

"Kion vi faras, Petro?" demandas la patrino. "Nenion!" respondas ŝia filo. "Do, kion faras vi, Karlo?" "Mi helpas lin!" respondas la alia. That's the first thing I ever read in German in a beginning textbook. I don't remember any German, but at least I remember the joke.

The magazine *Kontakto* publishes short articles labeled *facila* or *tre facila*. Both avoid complicated sentence structure and unusual grammar, and articles marked *tre facila* avoid participles other than those ending in *-anto*. For *facila* articles authors are asked to stick to a vocabulary of 900 common roots (including affixes and grammatical endings) and 527 for *tre*



D. Gary GRADY

Gary is Vice President of the American Association of Teachers of Esperanto (AATE). He lives in Durham, NC.

dgarygrady@frontier.com

facila. Other words are defined in terms of those on the list. For example, *araneo* is not included, but it could be defined as *timiga besteto kun ok piedoj*. [See "*La blanka ĉevalo*" in this issue, a story written using *Kontakto*'s "*facila*" guidelines. —Ed.]

You can find the vocabulary here, complete with links to definitions:

[<http://remush.be/tezauro/Kontakto.html>](http://remush.be/tezauro/Kontakto.html)

The list is very convenient for teachers and course authors, as it suggests which words are most useful to learn early on.

One of the most useful things students can do while reading is to keep handy a pocket notebook (or the electronic equivalent) in which to write down unfamiliar words with their definitions. Odds are they'll come across the same words again soon and will be able to find them already in their personal micro-dictionary, which helps reinforce the memory. It's also a useful study guide.

Besides *Kontakto*, a good source of reading material for *komencantoj* and *progresintoj* is the textbook *Esperanto — Learning and Using the International Language* by David Richardson. Children's books also tend to be relatively easy reading, and so are many early works of Esperanto. *Fundamenta Krestomatio* (1903), the earliest large collection of readings, has everything from fairy tales and jokes to sample business letters. A wide selection of books can be found

in the Esperanto-USA *Libroservo*. (Click on “Buy Stuff” at our website.)

In particular, search the catalog for works by Stefan MacGill. His books for younger readers through *progresintoj* are full of amusing stories, games, plays, puzzles, and a great deal of humor.

One of the first book-length works read by many students is *Karlo* by Edmond Privat, a very short novel (under 50 pages) that was originally published in 1909 and recounts the life of its hero from birth to marriage in an easy, readable style. There are many imaginative and memorable scenes, such as Karlo’s childhood dream of flying under a disk-shaped Earth. Another now-standard beginner’s book is Claude Piron’s short mystery *Gerda Malaperis* (1983). Both books are available in inexpensive editions from the *Libroservo*, and both are also available online for free. (*Karlo* is out of copyright, and the late Claude Piron gave his permission for *Gerda Malaperis* to be distributed on the Internet.) You can even find a full-length feature film adaptation of *Gerda Malaperis* on YouTube thanks to the generosity of the filmmakers.

More advanced students will profit from Boris Kolker’s *Vojaĝo en Esperantlando*, one of the best-selling recent books in Esperanto. Also worthy of note are the novel *La Ŝtona Urbo* by Anna Löwenstein (which uses only official root words) and William Auld’s classic collection *Paŝoj al Plena Posedo*, which is definitely not for beginners but includes many highly entertaining selections.

A great deal of other reading matter, including older out-of-copyright works and newer ones whose authors have

given permission, can be found online in various formats, many of them appropriate for tablet computers and e-book devices such as the Amazon Kindle, Barnes & Noble Nook, Sony Reader, and the like. Some are even suitable for reading on smart phones. Of course they can also be printed out on paper.

One caution: Older electronic versions may not have circumflexed letters, instead writing Ĉ as Cx or Ch. Others use an older encoding that looks like gibberish. In addition, some PDF (Portable Document Format) files are easy to read on e-book devices but some are not.

Incidentally, I highly recommend the free program *Calibre* which does an excellent job of organizing a library of electronic books on your computer and transferring them to your e-book reader or smart phone. It’s available for Windows, Mac, and Linux, and is compatible with more than a score of e-book devices (including every one I’ve ever heard of). See: <<http://calibre-ebook.com>>.

Finally, here are some useful websites:

- <http://en.lernu.net/biblioteko>
(or just go to Lernu.net and click on *Library*). Has reading suggestions and many stories available online (in some cases you can even have them read to you.) As a bonus, if you click on a word you immediately see its translation!
- <http://i-espero.info/files/elibroj>
Tons of reading matter in PDF format, including marvelously illustrated versions of the *Oz* novels of L. Frank Baum as translated by Donald Broadribb. The font in these is large enough to be readable on most e-readers. (Highly recommended.)

- <http://archive.org/details/OzEsperanto>

Another source of the *Oz* books.

- [http://gutenberg.org/wiki/Esperanto_\(Bookshelf\)](http://gutenberg.org/wiki/Esperanto_(Bookshelf))

Note the underscore between “Esperanto” and “(Bookshelf)” in the URL. This is a well-organized but not necessarily complete set of links to Project Gutenberg books in Esperanto. (Project Gutenberg is an on-line library of out-of-copyright books or those licensed by their authors.)

- <http://esperanto-rn.org.br/eo/livros>

Another set of books and shorter works in PDF format.

- <http://www.esperanto.be/fel/but/e-libro.php>

A source of more recent electronic books in Esperanto from the Flanders Esperanto-Ligo. (Note that these are not free, but your purchase helps support the authors and the publisher.)

- <http://esperanto-usa.org/retbutiko>

Actual books on genuine paper. Members of Esperanto-USA receive a discount, and non-members can even join online and get the discount immediately. ★



LIVING IN ESPERANTUJO

Sometimes you have to do it yourself

(Dankon al Daĉjo RUTAN)

La blanka ĉevalo

de Filippo DORCAS

La mateno estis por la blanka ĉevalo kiel tute nova vivo. Li alvenis frue al la kampo. Li staris kaj rigardis la mondon ĉirkaŭ si. Li vere estis feliĉa. Antaŭ li, videblis malplena bela kampo. Li ĝuis la tempon tie. Kion li faru?

Ĉu li simple staru tie en la sama loko kaj ĝui la momenton? Li ne sciis.

Ho, kio estis tio? Li rimarkis alian ĉevalon. Ĝi estis nigra ĉevalo. Ĝi staris tie ĉe la alia flanko de la kampo kaj **frontis** al li. La alia ĉevalo kuris iomete, kaj poste haltis kaj staris. La du ĉevaloj alfrontis unu la alian, rigardante unu la alian trans la kampo.

La blanka ĉevalo sciis nenion pri la nigra ĉevalo. La sperto estis por li tute nova. Li fakte ne sciis, ĉu la alia estus ĝeno. Eble ne. Li jam staris tie iom longe, kiam venis homoj al la mezo de la kampo. La homoj ne iris sur ĉevaloj, sed marŝis al la kampo. Venis kelkaj el diversaj direktoj. Kelkaj estis soldatoj, sed venis ankaŭ unu **kuriero**. La kuriero marŝis iom rapide, piedirante, sed la blanka ĉevalo kaj la nigra ĉevalo staris kaj faris nenion.

Reĝino aperis. La kuriero montris grandan estimon al la reĝino, kaj moviĝis por fari lokon por ŝi en la kampo. Post kiam la kuriero faris tion, la reĝino turnis sin al la blanka ĉevalo. Ŝi demandis al la blanka ĉevalo: “Ĉu vi povas helpi min? Se vi kaj la kuriero helpos min, ni povos preterpasi tiun nigran ĉevalon, kaj rezulte

de tio, ni havos ege bonan tagon. Ĉu vi konsentas?”

La ĉevalo bone sciis, ke li estis tie por helpi la reĝinan **moŝton**. Li certe ne pensu alimaniere.

La sekvantaj agoj okazis rapide. Ili ĉiuj kuris al la nigra ĉevalo. La nigra ĉevalo apenaŭ havis tempon por flankeniĝi kaj forkuri. Iu nigra kuriero aperis, sed la reĝino havis nenian kompaton por tiu malforta viro. Malantaŭ la linio de nigraj soldatoj disfalis nigra turo, kaj la blanka grupo ĉirkaŭis la nigran reĝon.

Boris SPASSKY staris kaj manpremis la manon de Bobby FISCHER por gratuli lin pro lia venko en ilia tria **ŝakludo**. En la kvara ludo, s-ro Spassky movis la blankan grupon, kaj s-ro Fischer havis la nigran.

En ĉiu ludo la ĉevaloj feliĉe revenis al la kampo, ĉiam pretaj por helpi.

Post kelkaj tagoj, Bobby Fischer iĝis monda **ĉampiono** pri ŝakludo. Tio okazis en la urbo Rejkjaviko, Islando, en 1972.

Klarigoj

ĉampion/o venkinto en grava sportludo.


kurier/o homo kiu rapide portas leterojn; en ŝako, peco kiu staras apud reĝo aŭ reĝino.

front/o antaŭa parto de objekto. ~i: sin turni kaj prezenti fronton, ekzemple por batali.

moŝt/o nomo de ĝentileco kaj respekto.

reĝina ~o: (Angle: *her royal highness*)

ŝak/o ludo kun 32 pecoj sur tabulo kun 64 nigraj kaj blankaj fakoj. ★



Falsaj amikoj

“Falsaj amikoj” estas vortoj en du lingvoj kiuj similas unu al la alia laŭforme, sed ne laŭsignife.

Ekzistas multaj tiaj vortoj en Esperanto kaj la angla. Ĝenerale ili ne kaŭzas grandajn malfacilaĵojn por la lernanto. Mi supozas, ke multaj angle parolantaj Esperanto-lernantoj iom amuziĝis je la unua ekkono de la verbo *farti*, sed rapide oni alkutimiĝas al ĝi kaj *farti* ne plu pensigas nin pri vorto en la angla. Bedaŭrinde, kelkaj falsaj amikoj en Esperanto ja estas erarigaj eĉ por spertaj parolantoj de nia lingvo. Pri kelkaj el tiuj stumbligiloj mi okupiĝos ĉi-sube.

Malfacilas rezisti la tenton uzi la vorton *eventuale* same kiel oni uzas *eventually* en la angla. Sed rezisti ni devas, se ni deziras skribi kaj paroli senerare. La difino de la vorto estas sufiĉe simpla. Laŭ ReVo, *eventuale* signifas “en okazo de bezono”. Por ĝuste esprimi la sencon de *eventually* en Esperanto, oni povas uzi *iam*, *fine*, aŭ *finfine*.

Por anglalingvanoj, *balanci* estas iom stranga verbo, ĉar vere ne ekzistas ekvivalento en la angla. La verbo signifas laŭ ReVo “movi ion tiel, ke ĝi alterne leviĝas kaj malleviĝas”, kaj ĝi tradukeblas anglan multmaniere laŭ la kunteksto. Ekzemple, *balanci la kapon* oni povus traduki al *to nod*, sed la vorton *balancilo* oni kutime tradukas al *seesaw*. Ĉiuokaze, ĝi havas nenion komunan kun la vorto *balance*, kiun oni esperantigas per diversaj vortoj depende de la celata senco.

Anglalingvanoj iafoje misuzas la vorton *efektiva* por traduki la anglan vorton *effective*. La ĝusta traduko ĉi-kaze tamen plej ofte estas *efika*. Kion do signifas *efek-*



Steven CYBULSKI

Steĉjo estas fervora gramatikemulo. Li nun loĝas en Madisono, Viskonsino.

stcybulski@gmail.com

tiva? Laŭ ReVo, la vorto signifas “reale ekzistanta, estanta ne nur ŝajna” kaj tradukeblas al *actual*. Oni tre ofte uzas la radikon *efektiv-* adverbe, pli-malpli same kiel oni uzas *actually* en la angla: “Ĉu plaĉas al vi spekti filmojn? Efektive, mi preferas legi.”

La Esperantaj verboj *puŝi* kaj *ŝovi* sonas kiel la anglaj verboj *push* kaj *shove*, kaj la signifoj de la Esperantaj verboj ne estas tute malsimilaj al tiuj de la anglalingvaj similonantoj. Tamen, ja estas grava diferenco inter tiuj vortoparoj. En la angla, *shove* estas multe pli forta ago ol *push*. Estas tute male en Esperanto; *ŝovi* estas la pli milda ago, kaj *puŝi* estas la pli forta (eĉ perforta) ago.

En tiu ĉi artikolo, mi atentigis al vi kelkajn falsajn amikojn kiuj ofte kaŭzas problemojn por anglalingvanoj, sed ja estas aliaj pri kiuj vi konsciu. Guglo-serĉo por “falsaj amikoj” rapide alkondukos vin al al multaj legindaj listoj de tiuspecaj vortoj. ★

Verku por *Usona Esperantisto!*



Ni daŭre serĉas kontribuantojn kiuj preta verki regulajn rubrikojn, aŭ ses- aŭ tri-fojojn jare. Se vi volus kontribui, proponu vin kaj vian ideon al la redakcio, ĉe:

bulteno@esperanto-usa.org

Dankon malgraŭe

Ŝi sidis en la drinkejo, sur malgranda seĝo farita el palmobranĉoj, kaj atendis la mendojn.

“Litron da palmvino!”

“Du litrojn da palmvino!”

“Alportu puran tason!”

Neniam ridetante, ŝi stariĝis kaj malrapide plenumis la mendojn. Poste ŝi revenis al la seĝo. Io silenta kaj malĝoja ĉirkaŭflirtis ŝin kune kun la muŝoj. Ŝia vizaĝo estis bele malpala, iom hela pro ŝvito, sed nemovebla, ŝtona. Ŝajnis, ke ŝi pensis pri ie alia, kaj neniu ĉi tie pensis pri ŝi.

“Donu alian litron al la blankulo!” iu kriis, kaj ŝi stariĝis. Ŝi alportis la vinon en malnova motoroleo-botelo.

“Dankon al vi”, mi diris.

“Danku al dio”, ŝi murmuris, kaj sin turnis por trovi sian seĝon.



La ĉambro estis malluma. Ĉiu fenestro estis fermita. Sinjoro Tata marŝis al la lito en la angulo de la ĉambro.

“Bonan matenon”, li diris.

La lito ne respondis.

“Bonan matenon, amikino, leviĝu!” li laŭte kriis.

La litotuko komencis malrapide boli kiel akaroj sub la haŭto de io mortinta. Post kelkaj momentoj elvenis tre maldika maljunulino. Ŝi sidigis, eltulis iom da muko, kaj malrapide alportis sian manon al siaj okuloj kaj ĝemis.

Ŝi nevidante elezamenis la ĉambron, trovis sian lambastonon kaj dolore marŝis tien, kie mi sidis, proksime al la pordo. “Bonvenon, onklo”, ŝi diris al mi.

En la lumo venanta tra la malfermita pordo mi vidis ke efektive ŝi estas juna.



Joshua MORRIS

Joshua dejoras en Kameruno por la usona Pac-Korpuso. Ĉi tie li dividas kun ni siajn ĉiutagajn spertojn.

joshxuo@gmail.com

Eble ŝi havis dek ok jarojn. Ŝi sidigis sur malmola, ligna seĝon kaj tremis.

Sinjoro Tata faris kelkajn demandojn en la moghama lingvo. Poste li klarigis al mi: “Antaŭ nelonge ĉi tiu knabino edziniĝis. La paro estis feliĉa kaj loĝis en Batibo, apuda urbo. Kelkajn monatojn poste ŝi komencis aŭdi ion en sia kapo, kiu sonas kvazaŭ ega akvofalo. Nun ŝi povas nek aŭdi nek vidi bone, kaj kiam ŝi marŝas pli ol iomete, ŝi nepre falas. La kapdoloro estas preskaŭ neeltenebla.”

Mi rigardis la knabinon: ŝi frotadis sian frunton, ŝiaj okuloj pendante suben pro la pezo de doloro.

Sinjoro Tata daŭrigis: “post kelkaj monatoj da malsano la edzo decidis, ke li ne ŝin volas plu, do li redonis la knabinon al ŝia familio. Nun ŝi pasigas la tagojn kun doloro kaj kulpo pro la rifuzo de sia edzo. Ŝi penas dormi, ĉar tiam la doloro malpliĝas.”

“Ĉu ŝi jam vizitis la malsanulejon?” mi demandis. “Kion diris la kuracistoj?”

“La kuracistoj donis medikamentojn, kiujn ŝi prenadas. Sed rigardu. Ŝia stato ne pliboniĝas.”

Dum kelkaj momentoj ni ne parolis; ni nur sidis silente. Tiam sinjoro Tata frapis siajn femurojn kaj diris hele, “Ni foriru.”

“Dankon pro via vizito, onklo,” la knabino diris al mi kiam mi stariĝis. “Dio benu vin.”

“Li jam min benis tro. Ĝis la revido.”

Sinjoro Tata fermis la pordon.



Estis malfrue. La suno jam subiris antaŭ du horoj. Mi ĵus revenis de apuda vilaĝo kaj pretigis min por enlitiĝi. Sed mi aŭdadis kriojn, kaj tra la fenestro mi vidis multajn homojn kiuj kuris ien. Mi iris ekstere kaj demandis al preterkuranto: “Kien vi ĉiuj rapidas?”

“Malgranda knabo ĵus mortis”, li respondis. “Ni kuras al la domo de liaj gepatroj.”

“Ĉu mi rajtas kunveni?”

“Kompreneble, sinjoro. Ni kuniru.”

Kiam ni alproksimiĝis al la domo, la virinoj komencis laŭte kaj drame ploregi kaj kriegi. Preskaŭ la tuta vilaĝanaro staris ekster la domo. Mi eniris. La mortinta etulo kuŝis sur tablo meze de la ĉambro, kovrita per helkolora tuko. Li havis eble dek unu jarojn. La patrino estis sur la planko, plorejante.

Junaj virinoj ploris kaj petis al dio: “Pro kio?! Kian pekegon ĉi tiu knabeto faris kontraŭ vi?” La maljunaj virinoj ploris sen demandi kial.

La sekvan tagon la familio enterigis la knabon. La familio-ĉefo klarigis la mortkialon: La infano ludis en nefinita konstruaĵo. Li falis sur metalan najlegon kaj liaj internaĵoj disŝutis. En malsanulejo ĥirurgiistoj sukcese remetis liajn organojn internen. Tamen post kelkaj semajnoj, cikatroj ŝtopis lian dikan inteston kaj li malsaniĝis denove. Li revenis al la malsanulejo por alia operacio, sed kiam kuracisto donis dormklisteron al la knabeto, lia koro ĉesis bati.

Mi rigardis la patrinon. Ŝi tremis, sed ŝi ne plu havis larmojn.



“Mi deziras ke la tero eksplodu nun, je ĉi tiu momento”, mi diris al Amy, alia pac-korpusa voluntulo. “Subite, perforte, kaj tute neatendite. Niaj animoj havus nenian ideon, pri kio okazis.”

Amy ne respondis. Ŝi kredis je vivo.

“Ĉu vi ne same deziras?”

“Ne precize”, ŝi diris.

“La tero ne plu restas en ekvilibro. La homaro suferas. Kaj mi antaŭvidas pli da sufero.”

“Ho! Tio ne estas tre maltima antaŭdiraĵo. Kompreneble sufero pligrandiĝos. Kaj se Dio volas ke ni suferu, ni devas suferi bone, kaj danku Lin pro tio.”

“Eble, eble”, mi respondis indifere.

“Cetere, ni lernas plej bone per sufero. Kion ni lernus per subita morto?”

“Mi certas ke estas multege da interesaj lerni en morto. Hm... eble anstataŭ la fino de la mondo vi dezirus kafon. Estas lakto kaj sukero.”

“Vi bone scias ke mi malamas kafon”, ŝi diris. “Sed mi trinkos varman lakton kun sukero.”

“Bonege. Kaj vi ĝin havos.” Mi iris en mian malgrandan kuirejon.

“Mi tute ne atendis”, mi diris, ignorante la formikojn kiuj rampis en la skatolon de laktpulvoro kaj tie mortis, “ke mi plidikiĝus ĉi tie. Mi jam aldonis almenaŭ 15 funtojn dum kvin monatoj.” Mi aldonis akvon al la pulvoro kaj metis la miksaĵon sur fajron.

“Mi malplidikiĝas”, Amy diris.

“Nu, se ne ekzistas ekvilibro en la mondo, almenaŭ ĝi ekzistas inter vi kaj mi.”

“Haha, lerta knabo vi estas.”

“Jen via lakto.”

“Dankon al vi”, ŝi diris.


“Danku al dio”, mi respondis. ★

A language of choice

When people learn that Esperanto is my family language, they often ask: “Why Esperanto and not Russian, your first language? Or English, your husband’s first language?” Well, for me, and almost every other Esperanto speaker, Esperanto is a language of choice—a language we chose to learn, and which became, for some of us, a family language. So why did we choose to learn Esperanto?

Because we believe in a better world. Imagine a world without language discrimination, where communication on a global scale is accessible to rich and poor alike! Esperanto speakers believe such a world is possible, and for many that idealism continues to be the primary reason for learning the International Language. It’s clear that speakers of dominant languages (such as English) have enormous advantages over others, and international organizations do nothing to change this situation (or, rather, do everything to maintain the status quo). To give just one example: in an international organization such as the UN, with almost 200 member countries, there are only six official languages. And when it comes to working languages, there is just English and French. That’s why we believe Esperanto is a big step on the long road to eliminating language discrimination.

Because we like to travel. For example, just recently at the U.S. Esperanto Convention in Emeryville, California, I met Amanda Higley—a young American who participated in a 3-week intensive course and then took off for Europe,



Jenja AMIS

Born in Kiev, Yevgeniya lived five years in Atlanta and currently resides in Montreal. She was an editor of *Kontakto*, and is now involved in the work of the Esperantic Studies Foundation.

yevgeniya_amis@yahoo.com

where she visited over a dozen countries thanks to the hosting/lodging service for Esperanto speakers, *Pasporta Servo* <<http://pasportaservo.org>>. And a few years ago, during the world Esperanto congress in Poland, I met Bruno and Maryvonne Robineau, a French couple and authors of the book *Eight years around the world*. They used Esperanto extensively during their trip and were able to experience cultures as they wouldn’t have had they chosen a more conventional way to travel. They participated in everyday life in different parts of the world, doing all kinds of work—from planting rice in Korea to teaching Esperanto in China.

To learn more about other cultures. Esperantists tend to be interested in other languages, cultures and geography. Contacts with other speakers and reading magazines in Esperanto (with articles from people from all over the world) help them to better understand different societies and broaden their horizons. “I’m sure my knowledge of other cultures was far superior to those of my teachers, and that I was without a doubt the only person at school who read *Estonian Anthology*”, (half) joked Humphrey Tonkin, president emeritus of the University of Hartford and author of numerous works, during the 2011 national convention of Esperanto-USA.

To have fun! I personally learned Esperanto out of linguistic curiosity, without knowing much of its cultural side, but I became really involved and inspired by its ideals after I participated in my first international seminar organized by the World Esperanto Youth Organization in Bulgaria about 10 years ago. About 30 people from a dozen countries participated. We studied, ate, had fun and made up jokes that are almost impossible to translate in any other language, and we all spoke Esperanto. To my great joy, I was able to understand everyone after only a few months of (not even intensive!) study. Then there were other Esperanto seminars and more than five years working as an editor of an Esperanto magazine, which allowed me to collect articles from people all over the world and to give a unique perspective on social, political and cultural issues.

Sometimes, even to find love! Let me put it straight: learning Esperanto to find a spouse might not work, but many people do meet that special someone during an Esperanto event or through correspondence. This actually happened to me: both I and my (then future) husband applied for the same job as an editor! We started working together, and in about a year he came to visit while in Europe, and this “ferocious” competition translated into a happy marriage!

To better learn other languages. There are a few schools in the UK participating in *Springboard to languages*—a program that offers a one- to four-year program of Esperanto teaching in order to raise language awareness, build transferable skills, and to serve as a prepara-

tion for learning other languages, because the regular structure of Esperanto actually helps in learning other languages. I can testify to this from my own experience: it helped me succeed in my German, Spanish and French classes. I also discovered that speaking Esperanto not only helps you learn other languages, it helps you to better understand *your own language* by seeing etymological connections between your mother tongue and other languages.

Like any other society, we're not perfect, but we do have a lot of things to be proud of: in its nearly 125-year history, the Esperanto community has created a culture of its own, with its own traditions, music, literature, magazines, radio stations, Wikipedia (with almost 150 000 articles) both national and international organizations (and even bureaucracy, believe it or not!), and countless websites. That is why putting together a complete list of reasons to learn Esperanto would be a presumptuous task, as every individual is unique and has their own reasons: some Esperantists are idealists, and others tend to be more pragmatic, some enjoy the communication side, others like to read original and translated literature in Esperanto (and some say that Esperanto translations are closer to the original).

I invite you to discover this interesting language and see what aspect of Esperanto interests you most. You can study online for free at a multi-lingual Esperanto learning portal <<http://lernu.net>> that recently celebrated 100 000 registered users, or you may find a traditional one-on-one course by doing a simple keyword search. ★

enigmoj

Kiel kutime, inter solvintoj de la krucvortenigmo ni lotumos \$10-rabaton de la libroservo. Ĉiuj membroj rajtas partopreni, sed solvoj nepre alvenu al la redakcio, aŭ poŝte aŭ rete, **antaŭ la 30-a de Februaro**. (Kontaktadreso troviĝas en pĝ. 1.) Bonŝancon!

Horizontale

1	2	3		4	5	6	7	8		9	10	11	
12				13						14			
15				16						17			
18								19					
				20		21	22		23		24	25	26
27	28	29			30		31				32		
33				34							35		
36				37					38				
39				40			41		42				
				43		44		45		46	47	48	
49	50	51				52	53						
54				55							56		
57				58							59		

- 1 Longa vest' unupeca
- 4 Manĝos kiel bebo
- 9 Adamedzino
- 12 Pensaĵ'
- 13 Rifuĝejo
- 14 "Fiŝo scias pri ___o ankaŭ sen via saĝo."
- 15 Unua parto de proverbo
- 18 Aldon' de plibeligaj detaloj
- 19 "Granda parolo, sed malgranda ___o."

- 20 Serpenta emblemo de la gazeto *Beletra Almanako*
- 23 "Saluton masonisto, mia papatro ___!"
- 27 Verukhaŭta amfibio
- 30 "Kion mi ne scias, tion mi ne ___as."
- 32 Peco
- 33 Konfederaci'
- 34 Eligis laŭtajn voĉsonojn,

- ekzemple pro dolor
- 35 Malplenaĵ'
- 36 Pozicio de kolo rilate al kapo
- 37 "Ŝafo donas sian ___n, por ke mastro havu panon."
- 38 Sincera, favora
- 39 Ĉefrolulo
- 41 Israela fluglinio kun bone priskriba nomo en Esperanto?

- 43 Rezina solvaĵ'
- 45 Rubandforma pastaĵ'
- 49 Dua parto de la proverbo en 15-horizontale
- 54 "Tuso kaj ___ ne estas kaŝeblaj."
- 55 Konformas sin al tio, kion oni ordonas
- 56 Dum lia deĵoro fondiĝis CWA, WPA, CCC kaj SSA

- 57 Usona verkisto WESTOVER
- 58 Luksa plezurŝipo
- 59 Nek estintece, nek estontece

Vertikale

- 1 Eventuala submara danĝero por n-ro 58 horizontale
- 2 Nazimpresil'?
- 3 Germana nomo de svisa urbo kiu gastigis UK-on en

1913, 1939, kaj 1947	la ekstertera kolektivo <i>Borg</i>	28 Havante nenium antaŭ si	46 Venena arbust', aŭ greka mitul' kiu aliformiĝis en laŭron
4 Marfiŝo kiu vivfine migras kontraŭflue en riveron	11 Jaroj ekde naskiĝo	29 Filament', ekzemple ero de histo	47 "Ŝiru vin ___ partojn, la mondo trian postulos."
5 Utiligu	16 Renforma semo el guŝo	31 Plant' kun kvin- petalaj floretoj purpuraj	48 Teleskop'
6 "En ___ angulo alia postulo."	17 Mov' de rivero	34 Subteraj kanaloj por malpurajo	49 Musmalamik'?
7 Frukt' el kiu oni produktas bongustan n-ro 40 vertikale	21 "Tute libera, kiel birdo ___."	38 Societ' por tiuj kun komunaj intereso	50 Fari ion ne precizigitan
8 Daŭre aŭdiĝis post ĉeso de la kaŭzo	22 "Rajdi sur ĉevalo ___ lernas sen falo."	40 Grasa fluaĵ'	51 "Kia la homo, tia lia ___o."
9 Interna	24 Buŝo de n-ro 42 vertikale	42 Daisy, Daffy, aŭ Donald	52 Nea konjunkcio kiu ofte aperas duope
10 "Rezisto ___as", laŭ devizo de	25 Mispaŝ'	44 Ses-edra	53 Longa, mallarĝa, kaj plata lignopec'
	26 Malolda		
	27 Eksprezidento alnomita "Vavo"		

D	D	E		H	A	R	O	J		E	J	O	
R	A	S		E	N	U	N	U		T	U	N	
A	L	T	E	R	I	Ĝ	I		L	I	K	O	
K	I	U	D	E	M	A	N	D	A	S			
			U	Z	O		E	R	O		S	D	
A	K	N		O	A	Z		O	V	A	C	I	
K	R	E	T		L	O	K		A	Z	E	N	
R	E	V	U	I		N	O	M		I	N	G	
A	N		S	R	A		K	O	M				
			T	I	U	N	E	E	R	A	R	A	S
S	V	I	S		K	A	T	A	L	O	G	I	
R	I	P		K	A	N	A	L		B	A	N	
O	R	A		G	R	A	S	A		O	D	O	

Solve de n-ro 2011:5

Ĉi-foje la lotajon gajnis **Walter MURAWSKI**. Gratulon al li, kaj laŭrojn al la aliaj solvintoj: Arnold VICTOR, Ellen EDDY, E. James LIEBERMAN, Cornelius J. MCKOWN, William PECKENPAUGH, Arlyn KERR, Peter MCCORQUODALE, Russ WILLIAMS, Briĉjo, Daĉjo RUTAN, Sally LAWTON, Ray REDD kaj Keneĉjo GOLDBERGO.


Do, kiom pezis tiu sumoisto?

Pasintnumere ni

aperigis matematikan enigmon el la libro "Gimnastiko por cerbo" de TACUMI Hirosi, havebla ĉe la retbutiko. La pezo de la sumoisto estas **126 kilogramoj**. Detalan pruvon sendis al ni s-ro Steĉjo NORVELL, leganto en Novlando, Kanado. Lia klarigo aperas sur la dorsflanka kovrilo.



New in the E-USA bookstore



POŝTMARKOJ EL ESPERANTUJO


Steven D. BREWER

Multaj originalaj hajkoj, verkitaj en Esperanto, kaj poste tradukitaj en la anglan. Kun multaj hajkoj estas bildo de tio, kio inspiris la verkiston. Mole bindita. 97 p. 2010. Usono. **\$14.80**

Order from **Esperanto-USA, PO Box 1129, El Cerrito CA 94530**, or online at <http://esperanto-usa.org/retbutiko>.


More complete descriptions can be found online. If a title is out of stock, the online bookstore can notify you by email when it becomes available again. Thanks largely to fluctuations in the value of the dollar, all prices are subject to change without notice.

Solvo de la matematika enigmo (vidu pĝ. 19)



Pro tio, ke la apogopunkto troviĝas inter la du pezoj (ŝnuroj), la baskulo estas levilo de la unua klaso: kiam ĝi estas en ekvilibro, la produto de la pezo kaj la brakolongo unuflanke de la apogopunkto egalas al la responda produto aliflanke.

Ni nomu la pezon de la sumoisto s , kaj la brakojn de la levilo ni nomu x kaj y . De la diagramoj ni vidas ke:



$$108 \cdot x = s \cdot y \quad \text{kaj} \quad s \cdot x = 147 \cdot y.$$

$$\text{Do } s = \frac{108 \cdot x}{y} \quad \text{kaj} \quad s = \frac{147 \cdot y}{x}.$$

$$\text{Tial, } \frac{108 \cdot x}{y} = \frac{147 \cdot y}{x} \Rightarrow 108 \cdot x^2 = 147 \cdot y^2$$

$$\Rightarrow \frac{x^2}{y^2} = \frac{147}{108} \Rightarrow \left(\frac{x}{y}\right)^2 = \frac{147}{108} \Rightarrow \frac{x}{y} = \sqrt{\frac{147}{108}} = \frac{7}{6} \quad \text{kaj} \quad \frac{y}{x} = \frac{6}{7}.$$

$$\text{Do, } s = \frac{108 \cdot 7}{6} = \frac{147 \cdot 6}{7} = 126. \quad \text{Do, la pezo de la sumoisto estas 126 kg.}$$